

Wim Jansen

(emeritiĝinta el / retired from)

Universiteit van Amsterdam, Nederlando / Netherlands

Enkorpigado kiel vortfara metodo en Esperanto

Resumo: Tiu ĉi studo sekvas pli fruajn publikigojn pri la vortstrukturo kaj vortfarado en Esperanto. Kompletige al analizoj pri derivado per leksikaj afiksoj kaj pri kunmetado per radikoj, la ĉi-prezentata artikolo traktas kiel vortkreatan metodon la enkorpigadon de substantivoj kaj adjektivoj en verbojn. Enkorpigebla substantivo povas esti subjekto aŭ rekta objekto en ekvivalenta predikato. Enkorpigebla adjektivo povas aperi kiel subjektpredikativo aŭ objektpredikativo en ekvivalenta predikato. Kontraste kun derivaĵoj kaj kunmetaĵoj, kiuj rezultas el leksikaj procezoj, la rezultoj de enkorpigado estas prezentataj kiel produktoj de gramatika procezo, kiuj leksikeriĝas cele al specifa apliko. Atento estas dediĉita ankaŭ al la t.n. sintezitaj objekt-genitivoj, pluderivaĵoj de enkorpigoj kiuj ŝajnas allasi en Esperanto du malsamajn priskribojn. La analizo enhavas rerigardon en la plej fruan historion de la morfologio en Esperanto, konsideras ĝian pluevoluadon ĝis la hodiaŭa tago, kaj komparas la ĉeeston de enkorpigemaj verboj en Esperanto kun la distribuo de enkorpigantaj verboj en etnaj lingvoj tutmonde. La teoria kadro de la studo estas la Funkcia Diskurs-Gramatiko.

Ŝlosilvortoj: Enkorpigado; Kunmetado; Vortfarado.

1 Enkonduko

Estas konate ke la Esperanta leksiko ege pligrandiĝis dum la pasintaj 130 kaj iom da jaroj, ne nur dank'al la necesa kreskigo de ĝia radikaro, sed ankaŭ dank'al la lerta uzado de la sistemoj de derivado kaj kunmetado, kiujn la lingvo dekomence proponis al la uzanto. La koncerna evoluado estas zorge registrita en aŭtoritataj gramatikoj kaj vortaroj, inter kiuj mi citu Kalocsay kaj Waringhien (1985), Wennergren (2005) kaj Waringhien (2020).

En tiu ĉi artikolo mi traktas vortfaran metodon kiun oni povas konsideri simila al kunmetado, tiusence ke ĝi koncernas ne dependajn leksikajn afiksojn, sed memstarajn radikojn. Tamen ĝi esence diferencas de kunmetado, ĉar ĝi ne baziĝas sur ia kvalifikado de la ĉefelemento (laŭ la konvencia terminologio en Esperanto) en vorto per la alkröo de iu flankelemento. Laŭ la ĉi-diskutota metodo oni kungluas la objekton, predikativon aŭ foje

eĉ la subjekton kun la akompana verbo. Mi proponas por tiu ĉi metodo la terminon *enkorpigado*. Kvankam oni trovas ekzemplojn de *enkorpiĝaĵoj* en la plej fruaj tekstoj en Esperanto, estas malfacile trovi propran nomon por ili kaj por la tekniko mem. La ĉi tie proponata *enkorpigo* klare venas de la angla *incorporation*, kiu disvastiĝis en aliajn lingvojn, sed ĉi tiu termino ne estas tute nova inventaĵo en Esperanto: ĝi estas trovebla en Koutny k.a. (2008: 13), kiu donas la kvalifikon *enkorpiga* inter la bazaj nocioj de la lingva tipologio. Ĝi ne aparte reaperas en ties ĉapitreto pri vortfarado, kie ĝi, tamen, estus senrezerve aplikebla. Waringhien (2020) mencias la derivitajn vortojn *enkorpigi* kaj *enkorpiĝi*, sed ne kun lingvistika signifo.

Mi traktos du kategoriojn de enkorpigoj. En la unua kategorio gluiĝas substantivo al la antaŭo de verbo, en la dua, adjektivo. La rezulto ĉiam estas kompleksa verbo. Kvankam la antaŭ nelonge aperinta Neves kaj Pabst (2018) registras certan nombron da enkorpigoj, enkondukitaj en la periodo 1887–1889, la fenomeno enkorpigo, kiel ajn nomata, ĝuas apartan mencion nek en la rusa eldono de D-r Ēsperanto (1887 [2004]), nek en ĝiaj postaj tradukoj pola, franca, germana kaj angla, nek eĉ en la pli malfrua Zamenhof (1905 [2007]).¹ Ankaŭ la pioniraj studoj pri la Esperanta morfologio de de Saussure ne elstarigas enkorpigon kiel aparte atentindan fenomenon. De Saussure (1914 [1982]: 23, 31) nomas la kvarelementan enkorpigon *homlevilo* (ĉu *lifto*?) kunmetita vorto, kiu devas esti analizita kiel *hom-levilo*, kontraste kun la same kvarelementa kunmetaĵo *fervojsignalo*, kiun oni analizas kiel *fervoj-signalo*, sen atentigo pri tio kio diferencigas la du kompleksajn vortojn. De Saussure (1915 [1969]: 21) mencias la enkorpigon *abonpago* samspire kun la leksika kunmetaĵo *vaporŝipo* kiel du tute samrangajn kunmetaĵojn.

Kalocsay kaj Waringhien (1985: 416), analizante la substantiv-enkorpigojn *domkonstrui*, *voĉdoni* kaj *leterskribi*, mencias ke “tiaj vortkonstruaĵoj estas tre sporadaj; el ili uziĝas ĝenerale nur kelkaj ‘ŝtoniĝintaj’: *voĉdoni*, *fiŝkapti*”. Temas ĉe tiuj ĉi aŭtoroj pri vortkonstruaĵoj sub la komuna denominatoro de kunmetaĵoj. Pri adjektiv-enkorpigo Kalocsay kaj Waringhien (1985: 403) skribas ke *ruĝpentri*, *plenŝtopi*, *satmanĝi* kaj *mortpiki* estas ekzemploj de predikataj adjektivoj kiel flankelementoj, kiuj modifas sian verban ĉefelementon ne maniere, sed kompletigas ĝin rezulte, ĉiuokaze en konstruaĵoj kiuj estas traktataj kiel kunmetaĵoj.

Ankaŭ Wennergren (2005: §37.4) ne uzas la terminon enkorpigo, sed nomas la metodon “vortigo de frazetoj”, en kiu frazeto povas esti tiel vortgrupo, kiel predikatstrukturo. En tiun ĉi laste nomitan kategorion falas la substantiv-enkorpigoj, pri kiuj la aŭtoro skribas: “Oni ankaŭ povas vortigi frazeton per verba finaĵo. Tiam la verba finaĵo reprezentas ian kaŝitan agon.

1 Dr Ēsperanto (1887 [2004]) prezentas certan nombron da derivitaj vortoj, kiuj ilustras la mekanismon de la afiksoj, sed enhavas en sia gramatika parto nur unu ekzemplon de (endocentra) kunmetaĵo, kaj entute malhavas enkorpigojn.

Kion la verba finaĵo reprezentas, oni devas lerni aparte por ĉiu tia vorto”. Tio estas pli klariga ol Kalocsay kaj Waringhien (1985). Aldone, ĉi tiu paragrafo montras referencon al jena teksto aliloke: “Multaj pensas, ke oni ne povas fari kombinojn, kies ĉefelemento montras agon, kaj kies antaŭelemento montras objekton de tiu ago, ekz.: *leterskribi, voĉdoni, domkonstrui*. Tio tamen ne estas prava”. Wennergren (2005), tamen, ne donas informojn pri la populareco de aŭ la eventuala rezisto kontraŭ la koncernaj enkorpigoj. Adjektiv-enkorpigoj ne estas pli detale menciitaj ol en Wennergren (2005: §37.3), kiu traktas la demandon pri la ligovokaloj en kompleksa vorto. En tiu ĉi kunteksto, *ruĝfarbi* estas konsiderata signife identa al *farbi ruĝa*.

La nun prezentata studo estas ero en serio pri la vortfarado en Esperanto laŭ la perspektivo de la universala lingvoteorio kiu nomiĝas Funkcia Diskurs-Gramatiko (FDG). Krom kelkaj artikoloj pri aliaj specifaj temoj, kiujn mi ne aparte referencos ĉi tie, la plej gravaj antaŭe aperintaj estas Jansen (2013a, 2013b, 2016 kaj 2020). Tiu ĉi verkaro estis forte inspirita de Lyons (1977) kaj de Hengeveld kaj Mackenzie (2008). En la sekcio 3 mi reprenos kelkajn ŝlosilajn nociojn kaj konkludojn el la menciitaj studoj por faciligi al la leganto la daŭrigon en la nun prezentata teksto kiel memstara dokumento.

2 Superrigardo de la enhavo

La artikolo estas strukturita jene. En sekcio 3 mi resumas la kernon de mia ĝis nun ellaborita priskribo de la Esperanta vortstrukturo ekde la difino de la radikoj kiel sintakse flekseblaj leksikeroj, tra la sistemo de derivado ĝis tiu de la kunmetado. Ambaŭ procezojn de vortfarado mi lokas en la leksikon de la lingvo. Sekcio 4 difinas kaj priskribas enkorpigadon kiel fundamente diferencon de la leksika kunmetado. Estos traktitaj substantivaj kaj adjektivaj enkorpigoj, kun plua diferencigo inter ambaŭ. La teoriar klarigon en la kadro de FDG mi faros en detala pritrakto de objekt-enkorpigoj. Resuma tabelo de enkorpigoj en Esperanto troviĝas fine de sekcio 4. Sekcio 5 donas historian kaj teoriar fonon de enkorpigoj kaj traktas la problemon de la sintezitaj objekt-genitivaj. Sekcio 6 metas la enkorpigadon en Esperanto en interlingvan perspektivon kaj sekcio 7 proponas konkludojn pri la fenomeno enkorpigado en Esperanto kaj pri la priskribo de sintezitaj objekt-genitivaj.

3 Esperanta vortfarado laŭ la Funkcia Diskurs-Gramatiko

En miaj antaŭaj studoj mi argumentis ke simpla leksika vorto en Esperanto konsistas el semantike klasifikita radikoj kaj sintakse difinita finaĵo (*a, o, e, i*). Tiu ĉi lasta estas konsiderata semantike malplena. La semantika klasifiko


distingas unuavice inter dependaj (memstare ne funkcikapablaj) membroj kaj sendependaj (memstare funkcikapablaj) membroj. La laste nomita grupo estas la plej bunta. Plej gravaj en ĝi estas la entoj: unuaordaj entoj (ekzistaĵoj kiel *dom-*, *hom-* kaj *kat-*), duaordaj entoj (okazaĵoj kiel *kongres-*) kaj triaordaj entoj (abstraktaĵoj kiel *ide-*). Ili prefere manifestiĝas kiel substantivaj kernoj en referenca vortgrupo (*bela kato*).²

Semantike dependa radiko povas esti situiga (kiel *ir-*, *manĝ-* kaj *don-*) aŭ kvalifika (kiel *bel-*, *rapid-*). Situiga radiko manifestiĝas verbe en atribua vortgrupo (ekzemple *mi iras*), pli ĝenerale en predikata strukturo, en kiu ĝi interligiĝas kun nul ĝis tri argumentoj kaj tempe situigas la agon aŭ staton. Kvalifika radiko ludas modifan rolon, tiel en referenca kiel en atribua vortgrupo, t.e. kiel adjektivo apud substantiva kerno (*bela kato*), aŭ kiel maniera adverbo apud verba kerno (*iras rapide*). La semantika kategorio al kiu Esperanta radiko apartenas, estas relative facile atribuebla dank'al la signifo kiun aŭtoritata vortaro donas al ĝi, origine la *Universala Vortaro* en Zamenhof (1905 [2007]), kaj la vortklaso al kiu la radiko prefere aliĝas, origine sugestita de la kvin diverslingvaj tradukoj en Zamenhof (1905 [2007]). Principe, ĉiu radiko estas kombinebla kun ĉiu el la kvar sintaksaj finaĵoj. Resume, la parolparta sistemo de Esperanto sur la nivelo de la radikoj estas priskribebla kiel semantike klasita, sed sintakse fleksebla aŭ neantaŭdeterminita.³

Derivado estas la kombinado de radiko kun leksika afikso. Vortoj, esprimantaj tre bazajn nociojn, kiuj en multaj lingvoj montriĝas nedismembrigeblaj, ofte estas derivaĵoj en Esperanto. Prenu ekzemple la vortojn *malbona*, *lernejo*, *tranĉilo*, *geedziĝi*. Jam tiu konstato sugestas ke la semantikaj kernoj de tiuj derivitaj vortoj, alivorte la radikaloj *malbon-* k.a., troviĝas en tiu sama leksika stoko en kiu hejmas la radikoj mem. Surbaze de simila argumentado por lingvoj kun aglutina morfologio komparebla kun tiu de Esperanto, Levelt (1989 [1991]) hipotezas ke la leksiko de tiaj lingvoj posedas procezilon kiu el simplaj leksikaj strukturoj preparas kompleksajn, antaŭ ol tiuj ĉi prilaboriĝas en la gramatiko. Pro la rigora distingo en Esperanto inter radikoj kaj vortoj ni povas imagi ke, uzante la disponeblajn leksikajn afiksojn en la lingvo, tiu procezilo estas dediĉita al la kreado de radikaloj el radikoj (ekzemple *kat-in-*, *mal-bel-*, *manĝ-et-*), kiuj nutras la gramatikon sinsekve tra ties semantika, morfosintaksa kaj fonologia tavoloj. En la morfosintakso, la derivita radikalo ricevas sia(j)n konvena(j)n finaĵo(j)n, depende de la funkcio kiun ĝi havas (ekzemple *mal-bel-aj kat-in-oj manĝ-et-as*).

2 Szerdahelyi (1976: 4, 9) nomis la formon kun la statistike rivelebla plej alta ŝanco de vortiĝo la primara (vort)formo.

3 Tiu ĉi tezo estis induktita en Jansen (2013a, 2013b) el la fruaj lingvoskriboj de Esperanto kaj la lingvouzo kiu estiĝis sur tiu bazo. Tiuloke mi atentigis pri la konstatebla iompost-ioma forlaso de la origina sintaksa flekseblo kun neambigua signifo-atribuo al ĉiu neprimara vorto, direkte al sintaksa specialiĝo de pli kaj pli da radikoj, tutunue — kaj konforme kun observoj interlingve — per la akcepto de verbaj radikoj kun aparta signifo.



Figuro 1: La kreo de enkorpigo en Esperanto laŭ FDG.

Kunmetado estas la interkombinado de radikoj aŭ radikaloj. Ĉar afikso (procezita en la leksiko) povas aplikiĝi ankaŭ al jam antaŭe kompletigita kunmetaĵo (ekzemple *-an* en *vapor-ŝip-an-*), la kunmetado mem ne povas esti gramatika procezo, sed devas necese okazi ankaŭ en la leksiko. En Esperanto, do, la leksiko liveras, apud simplaj radikoj, kompletajn blokojn de derivitaj kaj kunmetitaj radikaloj al la gramatiko por semantika kaj plua prilaboro.

En FDG, la vojo de la konceptado de lingva esprimo ĝis la fakta artikulacio de tiu ideo estas konsiderata unudirekta (vidu Figuron 1). Ĝi iras de la pragmatiko tra la semantiko (kiu estas nutrata per kontribuoj el la leksiko), la morfosintakso kaj la fonologio ĝis la artikulacio, de supre suben. Dum la mallonga tempo kiu pasas inter la formulado de ideo kaj la spontana artikulacio de la rezulta lingva esprimo, unudirekta fluo devas principe sufiĉi. Tial FDG ne enkalkulas reirojn supren aŭ bantojn inter la diversaj niveloj de la gramatiko aŭ kun enplekto de la leksiko. Evidente, ni parolas ĉi tie pri la rekta, spontana kreo de artikulacio, ne pri la konscia ĝustigo de eraro aŭ pri simila, celita interrompo de iu komencita fluo kaj posta rekiro laŭ eventuale alia vojo.

La kreo de derivaĵoj kaj kunmetaĵoj en la leksiko de Esperanto plene konformas kun la filozofio priskribita ĉi-supre. Necesas nur ke la procezilo en la leksiko rekonu la funkciojn kiuj regas la derivadon, kaj la starigeblon de hierarkiaj rilatoj inter ĉefaj kaj flankaj elementoj en la kunmetado, ekzemple la subordigon de *vapor-* al *ŝip-*, por krei kvalifikitan *ŝip-*, kiu nomiĝas *vaporŝip-*. La tiel kreita radikalo fluas en la semantikan strukturon de la intencata esprimo kaj neniam plu reiros al la leksiko.

4 Enkorpigado – la elirpunkto

Tiel Kalocsay kaj Waringhien (1985) kiel Wennergren (2005) citas ekzemplojn de enkorpigoj, eĉ se ili ne nomas ilin tiaj, kaj ili traktas enkorpigadon kiel vortfaran instrumenton (la laste nomita malpli hezite ol la unua) kun la konataj trajtoj de kunmetado. Se ni sekvas la hipotezon pri tio ke la leksiko estas la scenejo en kiu okazas ĉiuj procezoj de (vera) kunmetado kaj derivado, tiam la leksiko prezentas sin esplorinda ankaŭ kiel la loko en kiu enkorpigoj estas kreataj. En la kadro de FDG, tamen, tio konfrontas nin kun formala problemo. Mi aliros al ĝi en sekcio 4.1.

4.1 Substantiv-enkorpigoj

Kutime, enkorpigita substantivo estas la objekto de la klariga frazeto per kiu oni povas ilustrati (ne anstataŭigi!) enkorpigon. La faka literaturo ĝenerale konsentas pri jenaj tri kriterioj por la identigo de tiuj objekt-enkorpigoj:

- La enkorpigita objekto ne povas aperi kiel aparta paralela objekto: **voĉdoni sian voĉon* estas kontraŭgramatika esprimo.
- Objekt-enkorpigo havas pli mallarĝan signifokampon ol la klariga predikato kun aparta objekto. *Suĉi polvon* estas ago kiu estas imagebla en multaj diversaj cirkonstancoj, sed *polvosuĉi* estas limigita al la purigo de loĝejo aŭ oficejo per tiucela aparato.
- Objekt-enkorpigo celas alfonigi (eksterfokusigi) la priagaton (*voĉon, polvon*), kaj igas ke la aŭskultanto movu sian atenton de ĝi al la procezo mem kaj ties dezirata fino: la voĉdonado, la estraro, la partio k.s.; la purigado, la higieno, la hejmaj taskoj k.s.

Kiel anoncite, mia elira hipotezo estas ke la procezo de enkorpigado okazas en la leksiko, kiel ankaŭ la kunmetado, kaj ke ĝi, do, aplikiĝas al radikoj. Kiel ekzemplon mi proponas la tre frue atestitan *voĉdon-* (1888). Jen anoncas sin problemo. Estas vero ke *voĉ-* kaj *don-* estas du memstaraj radikoj, tiaj kiuj funkcias en kunmetado surbaze de hierarkia rilato, kiel en la frua zamenhofa ekzemplo *vaporŝipo*. En ĝi, la ĉefelemento *ŝip-* estas neellasebla, kontraste kun la flankelemento *vapor-*, kies neuzo tamen neniel lezus la pluan ekzistorajton de la ĉefelemento en senchava esprimo, uzebla en rekte komparebla kunteksto. La iela-tiela parigo de *voĉ-* kaj *don-*, kontraŭe, ne implicas la kombinon de iu ĉefa kun iu flanka elemento, sed respondas al la kreo de predikata strukturo kun la tiel nomataj nukleo *don-* kaj argumento *voĉ-*, en kiu neniu el la du elementoj estas senpune ellasebla. Predikataj strukturoj kreiĝas ne leksike, sed sur la semantika nivelo de la gramatiko. Se *voĉdon-* ne estas kreata en la leksiko, ĉu do ni akceptu ĝian kreon en la semantiko?

Ni unue rigardu ankaŭ la alian enkorpigon, kiun mi menciis supre, nome la verbon *polvosuĉi*. En la klariga priskribo *suĉi polvon* la radikoj *suĉ-* kaj *polv-*, nutrinte la semantikan tavolon de la gramatiko per leksikaj kontribuoj al predikata strukturo, ricevas siajn ĝustajn formojn *suĉi* kaj *polvon* ne en la semantiko, sed en la posta morfosintakso. La finan fazon de la gramatiko, la fonologian reprezenton, mi traktas (preskaŭ) identa al la morfosintaksa, dank'al la Esperanta literumo, kiu ne necesigas la uzon de aparta fonetika alfabeto, sed maksimume indikon pri la vortakcento (ĉi tie, kiam necese, per akuta signo super la koncerna vokalo): *súĉi pólvon*. La uzo en *polvosuĉ-* de *polv-* kaj *suĉ-* inkluzive de la substantiva *o* supozigas ke enkorpigoj naskiĝas post kiam iliaj konsistigaj elementoj estas trapasintaj la tutan gramatikon. Fakte, oni povus eĉ antaŭvidi la uzon de *polvonsuĉi*, sed la Esperanta tradicio preskribas *polvosuĉi*. Mi tuj revenos al tiu ĉi detalo.

Norde (2009: 112) asertas ke *iu ajn* formo de lingva materialo taŭgas por esti leksikerigita, kaj la aŭtorino subtenas tiun aserton per multaj ekzemploj

en la angla. Per la vortoj *vivuo* (el *vivu!*) kaj *neforĝesumino* (el *ne forĝesu min!*) Waringhien (2020) montras ke la eldiro validas ankaŭ por Esperanto. Laŭ mia propono, kiam estiĝas la kondiĉoj por uzi la leksikan materialon en *doni* (*sian*) *voĉon* aŭ en *suĉi polvon* kun speciala signifonuanco, parolantoj de Esperanto povas apliki la teknikon priskribitan de Norde, kaj remeti la leksikan materialon en novan kompleksan leksikeron. Temas tiam pri la konscia kreo de nova leksika unuo el parte neleksika materialo. Necesas ke tiu parte neleksika materialo estu antaŭe perceptita reale (kiel *voĉon doni* aŭ *pólvon súĉi*) kaj pli ol unu fojon, en sia fina artikulacio, t.e. post la fonologia pritrakto, alivorte: aŭdita aŭ legita.

Unu el la kriterioj por identigi kompleksan formon kiel enkorpigon estas la strategia decido de la parolanto, alfonigi la objekton kaj enfokusigi la procezon. En la frazeto *mi suĉas polvon* oni atingas tiun efikon ĝuste per inversigo de la vicordo S(VO) al S(OV): *mi polvon suĉas*.⁴ La normala informstrukturo de frazo ja montras de la komenco al la fino iron de pli bone konataj, pli fonaj al malpli bone konataj, pli novaj elementoj. La alfonigo de *polvon* aŭ la nereкта enfokusigo de *suĉas* en S(OV) diferencas de la t.n. kontrast-enfokusigo, ekzemple kiam oni volas emfazi ke la purigo koncernas ne sablon, sed polvon. Tiam, la inversigo estas pli drasta de (SV) O al O(SV): *polvon mi suĉas*.⁵ La ordoŝanĝo *suĉi polvon* > *polvon suĉi* diktiĝas sur la pragmatika nivelo per la disponebla enfokusiga funkcio en FDG (la malo, aŭtonoma alfoniga funkcio ne ekzistas) kaj plenumiĝas vortorde sur la morfosintaksa nivelo, por ke sur la fonologia nivelo prezentiĝu *pólvon súĉas* anstataŭ *súĉas pólvon*. El la leksika materialo en *pólvon súĉas* nun kreiĝas la kompleksaĵo *polvosuĉ-*, en kiu la klasmarkilo *o* de *polv* restas por faciligi la prononcadon. La decido, lasi la klasmarkilon aŭ elimini ĝin, estas prenata ankaŭ sur la fonologia nivelo, tiel same kiel en leksika kunmetado la decido aldoni iun ligovokalon al la endocentra *polvobros-* (*polvobróso*). Ĉar ĉiu enkorpigo naskiĝas kiel leksikerigo el du vortoj, la koncerna klasmarkilo de la liva⁶ elemento ne devas nepre malaperi. La ellason de tiu markilo mi konsideras imito laŭ la leĝo de la analogeco, kiun la parolanto perceptas inter enkorpigoj kaj la multe pli oftaj leksikaj kunmetaĵoj (*vaporŝipo* anstataŭ *vaporoŝipo*). La temo denove revenos fine de sekcio 5.

Mi do proponas solvon kiu unuflanke provas respekti la principon de nereiro en FDG tiom kiom eblas, aliflanke rekonas la apartan karakteron de enkorpigoj kaj la neblon krei ilin en la leksiko senpere kaj kun tiu sama

4 S = subjekto, V = verbo, O = (rekta) objekto.

5 Kontrast-enfokusigoj, precipe kombine kun la negacio, estas detale traktitaj en Jansen (2008).

6 En la sekva diskuto kun ofta kontrastigo de “dekstra” kaj “maldekstra” mi preferas uzi “liva” por la ĉi-lastata.

facileco kun kiu ni, spontane kaj pli malpli senpense, kreas normalajn derivaĵojn kaj kunmetaĵojn. Tamen, la ŝajne senlima pluderiveblo kaj plukunmeteblo de enkorpigoj (*voĉdonado, voĉdonilo, polvosuĉilo* k.t.p.) postulas ilian reaperon en la leksiko. Resume mi proponas ke enkorpigoj naskiĝas post 1) la aktivigo de la enfokusiga funkcio, kiu disponeblas sur la pragmatika nivelo de FDG; 2) la kreo de normala predikata strukturo kun leksika plenigo sur la semantika nivelo; 3) la kreo de la nombre kaj kaze bezonataj formoj kaj de la vortordo sur la morfosintaksa nivelo; 4) la unufoja leksikerigo de la fonologie preta kandidatvorto, kutime, sed ne devige sen ties fleksiaĵoj por marki nombron kaj kazon. La rezulto refluas al la leksiko kaj ennestiĝas en ĝi, konsistonta el du-tri nedismembrigeblaj elementoj (*voĉdon-, polvosuĉ-* k.s.), kun semantika klasifiko kaj signifo kiujn ĝi ricevas okaze de la leksikerigo, kaj kun ĉiuj propraĵoj kiujn havas la aliaj radikoj kaj radikaloj kiuj hejmas en la leksiko. Antaŭ ol leksikeriĝi, enkorpigaĵo trairas do la tutan gramatikon (vidu la dike presitajn sagojn en Figuro 1).

Objekt-enkorpigo okazas abunde en plursintezaj lingvoj, sed, laŭ Kalocsay kaj Waringhien (1985: ĉapitro 1), ekzistis aŭ ekzistas certa rezisto, ĉu de la parolantoj ĝenerale, ĉu de iuj gramatikistoj, kontraŭ tiu metodo de vortfarado en la Esperanto-morfologio. Malgraŭ tio, objekt-enkorpigoj ne limiĝas al la ekzemploj cititaj supre. Hazard-elekta serĉ-iro tra la interreto,⁷ provizore limigita al eblaj infinitivaj aperoj de ĉi tiaj enkorpigoj, rapide montras *akvoporti, panmanĝi, kaftrinki, vintrinki, biertrinki, vojmontri* kaj *monprunti*. Kompreneble tiu ĉi serĉo nenion diras pri la daŭrokapablo aŭ efemereco de tiuj trovoj, aŭ pri la kompleteco de la listo, sed almenaŭ ĝi montras ilian ekziston kaj pruvas ke la temo vivas.

En la sintakso de Esperanto la subjekto en frazo povas esti ellasita nur en la okazo de kunordigo de du frazoj. Tiam, se la subjekto de la dua frazo egalas al tiu de la unua, la dua povas elfali (*mi salutis kaj mi foriris*). Krome, meteologiaj priskriboj kiel *pluvas* malhavas subjekton. Kiam mankas semantika aganto, en Esperanto oni ne aplikas falsan subjekton (ekzemple angle *it*, france *il*, germane *es*). Tial, kiam ni serĉas kandidaton por enkorpigo, neverŝajne ni trovos subjekton, kiu ja ne devas foresti kiel eksplicita argumento. Tamen, dua serĉ-iro en la interreto montris la ekziston de kelkaj subjekt-enkorpigoj. Provizore ili ĉiuj koncernas naturajn fenomenojn iel kompareblajn kun la meteologiaj priskriboj kiujn mi supre menciis: *tertremis* kun la signifo *estis (okazis) tertremo, sunbrilis*, t.e. *la suno brilis* kaj *ventblovas*, t.e. *estas (blovas) vento*, kun sume centoj da trafoj; Waringhien (2020) donas la substantivon *sunsubiro*. Ĉiuj tiuj subjekt-enkorpigoj lasas la frazan kuntekston sensubjekta. Laŭ la malmultaj atestaĵoj haveblaj, ŝajnas

⁷ Laste kontrolita la 3-an de aprilo 2021.

ke la enkorpigaj kaj la klarigaj frazetoj havas la saman signifon kaj ke la elekto inter la sinteza kaj analiza formoj estas afero de stilo aŭ de persona prefero. Estas ankaŭ interese ke en la klarigaj frazetoj, ĉiuj enkorpigitaĵoj subjektoj estas priagatoj en dinamika *unuargumenta* predikato, analoge al la enkorpigitaĵoj objektoj, kiuj estas priagatoj en dinamika *duargumenta* predikato. Agantoj, do, tute ne allasas enkorpigon.

4.2 Adjektiv-enkorpigaj

Kalocsay kaj Waringhien (1985: 403) donas, i.a., la verboformon *ruĝpentri*, kiu enkorpigas *ruĝa* en *pentri*, sed, analoge al la kazoj *voĉdon-* kaj *polvosuĉ-*, traktitaj supre, la rilato inter *ruĝ-* kaj *pentr-* ne estas hierarkia. *Ruĝa* ne iel modifas la agon *pentri*, sed estas la rezulto de la ago, kaj la du elementoj sidas en predikata strukturo, en kiu *ruĝa* estas la objekt-rilata predikat-adjektivo apud *pentri* (*pentri ion ruĝa*). La teoria pravigo de *ruĝpentri* kiel enkorpigo sekvas la samajn liniojn kiel tiu de *polvosuĉi* aŭ *voĉdoni* kaj kondukas al la propono, trakti ĝin kiel gramatikan kombinon kiu formiĝas tra ĉiuj niveloj de la gramatiko kaj pretiĝas en la fonologio por leksikerigo kaj unufoja transdono al la leksiko. Simile objekt-rilata estas *mortpiki* (*piki iun morta*), sed malsama estas la ekzemplo *satmanĝi* kiun donas la aŭtoroj, ĉar en tiu ĉi okazo la enkorpigita predikat-adjektivo *sata* estas subjekt-rilata.

Se ni reiras al la tri kriterioj por identigi substantivan objekt-enkorpigon en la komenco de sekcio 4.1, ni konstatas ke la unua validas ankaŭ ĉi tie: **ruĝpentri ion ruĝa* estas kontraŭgramatika esprimo. Sed la dua, pri la pli mallarĝa senco de la enkorpigo, eble ne celtrafas. Almenaŭ laŭ mia sperto, kun ĉeesta objekto ne estas iu signifodiferenco inter la enkorpigo en *ruĝpentri domon* kaj la analiza esprimo *pentri domon ruĝa*, kaj laŭ mia scio, ankaŭ ne ekzistas fruaj aŭ modernaj tekstoj en Esperanto kun kompara studo pri la du variantoj. Ankaŭ pri la tria kriterio, ĉi-kaze pri la alfonigo de la rezulto *ruĝa* kaj la enfokusigo de *pentri*, mi ne certas. Pli da esplorado necesas por eltrovi ĉu adjektiv-enkorpigaj havas la saman statuson kiel substantiv-enkorpigaj, ĉu ili rekoneblas laŭ la samaj kriterioj de 4.1, aŭ ĉu ili prefere estu konsiderataj kiel libere elekteblaj leksikerigitaj variantoj de predikato.

Unu spekulativo pri la kunekzistado de du ŝajne samsignifaj variantoj povas esti ke la alternado inter (sinteza) enkorpigo kaj (analiza) predikato iel respregulas la importon en Esperanton de disigeblaj verboj el la germana aŭ jida lingvoj, kiel la ekzemplo *plenŝtopi*. La germana ekvivalento de *plenŝtopi* estas la sinteza *voll-stopfen* en la infinitivo, kiu disfalas en du partojn en finitaj tensesprimoj kiel *er stopft voll* (*li ŝtopas plena*). Per tio mi ne volas sugesti ke Esperanto sekvus la uzomodelon de la germana, nur ke ĝi disponas pri kompareblaj paroj.

Enkorpigoj en Esperanto ekzistas. Neves kaj Pabst (2018) listigas buntan kolekton de infinitivoj kaj ties derivaĵoj kiuj ekuziĝis jam dum la jaroj 1887–1889. Mi citas ilin en la Aldonoj 1 kaj 2. Kiel montras la dekstraj kolumnoj en la Aldonoj, Waringhien (2020) pruvas la pluvivadon de malnovaj kaj la disvastiĝon ankaŭ de novaj formoj. Hazardaj ret-serĉoj (sekcio 4.1) montras la ekziston de pliaj, PIV-e neregistritaj formoj. Resume, mi distingas la kvar prototipojn de Tabelo 1:

Tipo	Liva elemento	Dekstra elemento	Primara vorto
Substantiva objekt-enkorpigo	<i>voĉo polvon</i>	<i>doni suĉi</i>	<i>voĉdoni polvosuĉi</i>
Substantiva subjekt-enkorpigo	<i>tero vento</i>	<i>tremi blovi</i>	<i>tertremi ventblovi</i>
Adjektiva objektpredikativa enkorpigo	<i>ruĝa morta</i>	<i>pentri piki</i>	<i>ruĝpentri mortpiki</i>
Adjektiva subjektpredikativa enkorpigo	<i>sata morta</i>	<i>manĝi fali</i>	<i>satmanĝi mortfali</i>

Tabelo 1: Prototipoj de enkorpigoj en Esperanto.

5 Iom pli da historio, iom pli da teorio

En D-r Esperanto (1887 [2004]) la vortkunmetado en Esperanto startis kun unu ekzemplo de endocentra kunmetaĵo (*vaporŝipo*) en la gramatika parto, neniuj aliaj ekzemploj tiuloke aŭ en la aliaj Esperantlingvaj tekstoj de la verketo, kaj eĉ ne aludo al la iom speciala instrumento kiun mi traktas ĉi tie sub la nomo enkorpigo. Postfakte, estas neeviteble konstati ke la lingvo latente ebligis krei pli nuancitan instrumentaron por la formado de multaj aliaj tipoj de endocentra kaj ekzocentra kunmetaĵoj kaj de enkorpigoj, kaj ke la unuaj verkistoj kaj tradukistoj verŝajne tre fervore paŭsis modelojn el siaj denaskaj lingvoj por vivi tiun instrumentaron. Neves kaj Pabst (2018) plifaciligas la pristudon de la estiĝo de ĉiuj novaj kompleksaj vortoj post *vaporŝipo* en la komenca periodo 1887–1889. La alkroĉitaj Aldonoj 1 kaj 2 montras la rezultojn de tiu kreema agado sur la kampo de la enkorpigoj. Aldono 1 resumas ĉiujn trafojn de kombinoj de liva radiko kvalifika (kaŝanta⁸ adjektivon) kun dekstra radiko situiga (kaŝanta verbon), kun eventuala

⁸ Malantaŭ la semantika kvalifiko ja kaŝiĝas primare adjektivo. Estas pli nature en Esperanto uzi radikon kiel serĉkriterion, eĉ se fine ni volas trovi enkorpigojn, kiuj estas kombinoj de vortoj.

derivita formo kaj la laŭokaze registrita vortigo. Aldono 2 resumas ĉiujn trafojn de kombinoj de liva radiko enta (kaŝanta substantivon) kun dekstra radiko situiga (kaŝanta verbon), denove kun eventuala derivaĵo kaj la laŭokaze registrita vortigo.

La serĉkriterio por Aldono 1 liveris komence 65 radik-kombinojn. Multaj el ili ne kandidatas kiel enkorpiĝoj laŭ la kriterioj detalitaj en sekcio 4.1, ĉar la interradika rilato estas hierarkia kaj la signifo ne pruveble diferencas de tiu de vortgrupo konsistanta el la sama verbo kun aparta adverbo (ekzemple *bonodori* apud *bone odori*). Mi provizore konsideras ilin leksikaj alternativoj de la pli naturaj analizaj konstruaĵoj. Ilia ekzisto estas ekster la intereso de tiu ĉi artikolo. Estas 15 trafoj en kiuj la liva elemento ŝajnas kaŝi adjektivon, sed fakte kaŝas substantivon. Ekzemple en *fortuzo* la elemento *fort* supozigas rekondukon al la primara *forta* / *forte*, sed tia kombino kun la substantivigita radiko *uz-* neniel respondus al la celata signifo de *uzo de forto* / *forteco*. Tiun ĉi grupon de 15 mi transskribas al Aldono 2, al kiu mi revenos poste. La 14 adjektiv-enkorpiĝoj kiuj restas, koncernas 6 diversajn verbojn kiuj montriĝas enkorpiĝemaj: *bati*, *blovi*, *nutri*, *skribi*, *ŝtopi*, *ŝuti* kun sume 7 enkorpiĝoj de adjektivaj objekt-predikativoj (*bati* liveras *ebenbati* kaj *plenbati*). Al la atestaĵoj aldoniĝas 2 participoj (*-ita*) kaj 2 rektaj vortigoj per *-a*, kiuj estas konsidereblaj koncizigoj de *-anta*. Nur 2 atestaĵoj aldonas kroman semantikan materialon per *-ul* kaj *-ad*. La distribuo en tiu ĉi historia materialo de 11 verbecaj atestaĵoj (inter kiuj 7 infinitivoj) kontraŭ 3 neverbecaj supozigas la unuaecon de la adjektiv-enkorpiĝo en la infinitiva verbo kiel bazo por kompletigaj konjugaciaj formoj kaj pluderivado.

Estas interese observi ke la 111 substantiv-enkorpiĝoj en Aldono 2, malgraŭ tio ke ili enhavas 50 malsamajn verboformojn, atestas pri nur 2 infinitivoj (*ĉevalkuraci* kaj *partopreni*), 6 participaj / gerundiaj formoj (*-anta/e*) kaj 17 rektaj vortigoj per *-a*, kiujn mi, kiel supre, konsideras koncizigoj de *-anta*, sume pri 25 verbecaj formoj. Ĉiuj restaj 86 atestaĵoj enhavas kroman semantikan materialon tre diversspecan, en malkreska ordo: per *-o*, konciza reprezento de *-ado*, *-aĵo* aŭ *-eco*; per *-anto*, *-isto*, *-ado*, *-ilo*, *-ejo*, *-ulo*, *-emo*, *-aĵo*, *-eco*. La distribuo de 25 verbecaj atestaĵoj (inter kiuj nur 2 infinitivoj) kontraŭ 86 neverbecaj akre kontrastas kun la observoj kiujn mi resumis ĉi-supre por la enkorpiĝitaj adjektivaj objekt-predikativoj, kaj estus neprave insisti ankaŭ ĉi tie sur la unuaeco de la infinitiva verbo por substantiv-enkorpiĝoj. La dua tabelo en Aldono 2, tiu de la transskriboj de la ŝajnaj adjektiv-enkorpiĝoj el la malneta rezulto de la koncerna traserĉo de Neves kaj Pabst (2018) ne esence ŝanĝas la ĝeneralan bildon kiun mi konstruis ĉi-supre. Ĝi aldonas nur unu novan verboformon (*intenci*) al la 25 jam kolektitaj. La distribuo de la atestaĵoj estas pli interesa: kvankam klare temas pri kaŝitaj substantiv-enkorpiĝoj, la plimulto (10) de la atestitaj formoj estas verbeca, kun 2 infinitivoj, kaj

8 koncizigitaj participaj aŭ gerundiaj formoj, kontraŭ 5 neverbecaj. Tiu ĉi rezulto pliproksimiĝas al la adjektiv-enkorpigoj de Aldono 1 ol al la supra tabelo de substantiv-enkorpigoj. Ĝi malkaŝas la heziton de la lingvo-uzanto, rekoni elementon kiel *bon* kaj *riĉ* kiel reston de substantivo, kaj akcepti ke ne nur ento, sed ankaŭ kvalifiko povas roli substantive.

El sume 57 derivaĵoj en Aldono 2, la plej multaj estas rekondukeblaj al objekt-enkorpigoj, ekzemple *gastamo* < *gastami* (*oni amas gastojn*), *morinstruo* < *morinstrui* (*iu instruas la morojn*) kaj *bonhava* < *havanta bonon*. Esceptoj estas *dentsono*, *orelkuŝaĵoj*, *ŝippereo* kaj *sunkuŝiĝo*, kiuj estas rekondukeblaj al subjekt-enkorpigoj. Kelkaj trafoj aspektas kiel misformaĵoj el la pionira periodo de Esperanto, kaj estu prefere neglektitaj en la analizoj, ekzemple *akvokonduko* (kiu devus esti *akvokondukilo*), *akvoturn(ej)o* (kiu devus esti *akvoturniĝejo*). Kompleksaĵoj kiel *bierfaristo* kun la formo $N_1N_2^9$ facile interpreteblas kiel ekvivalentoj de la substantiva vortgrupo N_2 de N_1 . Tiel, *bierfaristo* montriĝas parafrazebla kiel *faristo de biero*, en kiu la prepoziciaĵo kun *biero* ne modifas *faristo*, sed indikas la objekton kiun produktas la *faristo*. Sekve, kompleksaĵoj kiel *bierfaristo* estas konsidereblaj kiel sintezaj variantoj de la t.n. objekt-genitivo. En sia komento pri la anglalingva ekzemplo *sword-swallower*, Esperante *glavglutisto* (iam fama kermesa artisto), Hengeveld kaj Mackenzie (2008: 217) mencias ke la neekzisto de aparta **swallower* aŭ *glutisto* estas signo pri tio ke *sword* en *swallower* ne estas parto de leksika kunmetaĵo, sed argumento en predikat-strukturo. Mi dubas ke tiu argumento estas konvinka en Esperanto. Kvankam *-ist* ne estas la plej konvena ekzempla sufikso en tiu ĉi diskuto, tamen *glutisto*, kaj eĉ *isto*, estas imageblaj vortoj.¹⁰ Ili estas ne same facile uzeblaj kiel radikvortoj, ekzemple oni ne povas komenci rakonton per la frazo **Johano estas bredisto* (ĉar la leganto mirus: bredisto de kio?), por ne paroli pri **Johano estas isto*. Male, tiaj subdeterminitaj formoj bone funkcias en anaforaj referencoj kiel *Petro intencas aĉeti bovojn. Johano estas ilia bredisto*. Por reveni al la *bierfaristo* per kiu ni komencis: ĉu, do, dismembrigi ĝin kiel *bier-faristo*, kaj preteratenti ke *bier* ne maniere modifas *farist* kaj sekve ne kandidatas kiel flankelemento en leksika kunmetaĵo, aŭ kiel *bierfar-isto*, insistante pri la enkorpigaĵo *bierfar-* kiel bazo por pluderivado per *-ist*? Granda plimulto de la trafoj en Aldono 2 konfirmas la ekziston de kompleksaĵoj kiel *bierfaristo* (*homevitulo*, *librovendisto*, *plankfrotisto* k.t.p.) sen spuro de iu enkorpigita verboformo (**homeviti*, **librovendi*, **plankfroti*) kiel bazo. Mi inklinas pledi por ne tro rigora kondamno de *bierfarist* kiel leksika kunmetaĵo, ĉar finfine la elemento *bier* iel nuancas la elementon *farist*, limigas la kategorion de la faristoj al tiuj kiuj okupiĝas pri biero. Paralele, la registrita ekzisto de la verbo *bierfari* en

9 N = nomo (substantivo).

10 *Ulo* kaj *aro* estas multe pli oftaj leksikerigoj de la sufiksoj *-ul* kaj *-ar*, ol *isto* de *-ist*.

Waringhien (2020) en tiu ĉi okazo pravas la paralelan percepton de *bierfar* kiel leksikerigitan enkorpiĝon el *bieron fari*, de kiu tute nature deriviĝas *bierfaristo*, *bierfarejo*, *bierfarado* k.a.

Kelkaj finvortoj pri la dua tabelo en Aldono 2. La kvalifika radiko kiu ŝajne restas kiel liva elemento de la enkorpiĝo de *bono* en *bonfari* k.a. estas reale la senfinaja resto de la substantivigita kvalifiko (ĉi tie *bono*) kiel hiperonimo (ĉi tie de *bonaĵo* kaj *boneco*), kiel evidentigas la klariga esprimo *fari bon(aĵ)on al iu*. Paroli pri “la senfinaja resto” de vorto ne signifas ke ni bazu la enkorpiĝadon sur radikoj! La eventuala ligovokalo inter du elementoj de leksika kunmetaĵo estas fonologie trudita aldono de io kio *ne* partoprenis en la leksika kunmetaĵo, kiu ja traktas radikojn, ne vortojn (vidu la koncernan diskuton en Jansen 2020). Male, en la okazo de enkorpiĝoj ni leksikerigas sintaksan vortkombinon. Principe, la fonologia finpreparo de la enkorpiĝo povas kaŭzi la restigon de la klasmarkilo, kiel en *bieron fari* > *bierofari* aŭ eĉ la kazomarkilon en *bieronfari* (se ni pensas pri *forgesumino* aŭ *sinmortigo*) kaj *ruĝa pentri* > *ruĝapentri*. Sed, sub la premo de la analogeco oni kreas prefere *bierfari* kaj *ruĝpentri*. Nepran bezonon lasi la vortklasmarkilon oni trovas en la okazo de *fortuzo*, en kiu la liva elemento (kiel en ĉiu enkorpiĝo de Aldono 2) venas de substantivo, t.e. de la substantivigita kvalifiko *fort-*, kiu ne devas perdi sian klasmarkilon: *fortuzo* < *fortouzi* < *forton uzi*.

6 Enkorpiĝado en interlingva perspektivo

Ĉi-sube mi prezentas tre koncizan komparon inter Esperanto kaj nombro da etnaj enkorpiĝantaj lingvoj. La bazo por la komparo estas la materialo publikigita en Olthof (2020). El totala nombro de 259 substantiv-enkorpiĝantaj lingvoj, apartenantaj al 82 diversaj familioj tutmonde, la aŭtorino tiris samplon de la plej detale priskribitaj kaj plej facile alireblaj 50 lingvoj, ĉiuj el diversaj lingvofamilioj. En tiu ĉi sampla 22 verboj montriĝas la plej ofte registritaj kun enkorpiĝa kapablo en minimume 10 el la sumo de 50 lingvoj (Olthof 2020: 139). Laŭ la rezulta statistiko, la plej ofte renkontata enkorpiĝanta verbo estas *tranĉi*,¹¹ kiu atestiĝas en 22 el 50 lingvoj, la du plej maloftaj estas *kapti* kaj *morti* en la sojla minimumo de 10 lingvoj. Ĉi-sube mi listigas la 22 plej ofte uzatajn enkorpiĝantajn verbojn, laŭ malkreska ofteco – el la originala listo de Olthof (2020) mi forigis la kombinon de la kopulo *esti* kun adjektivo (ekzemple **sekesti* < *esti seka*), kiu povas esprimiĝi en Esperanto kiel senpera verbigo (*seki*):

tranĉi, fari, manĝi, serĉi, doni, lavi, meti, rompi, mortigi, aĉeti, sperti doloron,¹² iri, havi, preni, fali, bati, ĉasi, sidigi, forigi, vidi, kapti, morti.

11 Ĉiuj estas miaj tradukoj el la angla.

12 La diferenco inter la originala *sperti doloron* kaj la Esperanta *kaŭzi doloron* estas neglektita.

Dike presitaj en ĉi-supra listo estas tiuj verboj kiuj estas uzataj por substantiv-enkorpigoj en nuntempa Esperanto laŭ Waringhien (2020). Ili estas retroveblaj en la dekstraj kolumnoj de Aldonoj 1 kaj 2. Estas cititaj nur tiuj enkorpigoj kiuj aperas pure verbe, ĉu kiel infinitivoj, ĉu kiel tensaj aŭ modaj formoj finiĝantaj per *-as*, *-is*, *-os* aŭ *-us*. Aliklasaj vortoj kaj derivaĵoj ne estas kalkulitaj en tiu ĉi eta komparo. Du substantiv-enkorpigantaj verboj ekster la listo de Olthof estas registritaj en Neves kaj Pabst (2018) sed ne kapvorte en Waringhien (2020): *intenci* kaj *kuraci*. Aliaj inverse: *esplori*, *fleksi*, *mezuri* kaj *tuŝi*. Fine ekzistas ekzemploj de objekt-enkorpigoj, ĉu en la literaturo ĉu interrete, kiuj ankoraŭ ne trovis la vojon al aŭtoritata vortaro. Ili spronu nin al plua serĉado, se ni volas desegni pli kompletan kaj ĝisdatan mapon de enkorpigoj kaj priskribi ankaŭ ilian oftecon, historian kaj aktualan.

7 Konkludoj

Enkorpigado ekzistas en Esperanto. Ĝi estas vortfara sistemo kiu estas efike klarigebla per la metodoj de la Funkcia Diskurs-Gramatiko kiel bazita sur la leksikerigo de plurvorta gramatika konstruaĵo. Ĝi prepariĝas pragmatike, semantike kaj morfosintakse, kaj kompletiĝas sur la fonologia nivelo. La rezulto refluas tra la kunteksta komponanto al la leksiko kaj renaskiĝas tie kiel nedismembrigebla kompleksa radikalo. Enkorpigado, kiel eksterleksika procezo, estas malpli facile alirebla sistemo ol la leksikaj kunmetado kaj derivado, sed la leksikeriga vojo ĉi tie proponata estas tute natura fenomeno. Estas neniu kialo por pledi ke la uzanto de Esperanto rezignu pri enkorpigado kiel vortfara metodo.

Estas interese konstati ke Esperanto dividas plurajn enkorpigemajn verbojn kun la plej oftaj renkontataj interlingve laŭ Olthof (2020): *fari*, *doni*, *preni* kaj *kapti*. La plej ofte registritaj enkorpigantaj verboj do aperas ankaŭ en Esperanto kiel enkorpigemaj verboj, sed restas esplorinda la demando ĉu en Esperanto ekzistas enkorpigemaj verboj kiuj entute mankas ĉe Olthof.

La Esperanta leksiko montras oftajn okazojn de sintezitaj objekt-genitivoj, kiuj allasas leksikan rilatigon de posedanto al ties posedaĵo, de havanto al ties havaĵo k.s. La limiga funkcio de la flankelemento kaj la ekzistorajto de la memstarigita ĉefelemento (ekzemple en *bier-faristo*) subtenas tian analizon alternative al la pluderivado de enkorpigaĵo (*bierfar-isto*), des pli ĉar en dekoj da okazoj registritaj en Aldono 2 ĉeestas la kompleksa substantivo, sed mankas la enkorpigo kiu devus esti ĝia bazo (baze de *herbmanĝanto* mankas *herbmanĝi*).

Bibliografio

- D-r Ĝesperanto (1887 [2004]). *Международный языкъ. Предисловіе и полный учебникъ* [*La Internacia Lingvo. Antaŭparolo kaj plena lernolibro, en la rusa*]. Moskva: Impeto.
- Hengeveld, K., Mackenzie, J. L. (2008). *Functional discourse grammar: A typologically-based theory of language structure*. Oxford: Oxford University Press.
- Jansen, W. (2008). *Naturaj vortordoj en Esperanto*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Jansen, W. (2013a). Radikoj kaj vortoj en Esperanto. *Esperantologio/Esperanto Studies*, 6(6), 9-43.
- Jansen, W. (2013b). Esperanto parts of speech in functional discourse grammar. *Linguistics*, 51(3), 611-652.
- Jansen, W. (2016). Derivation in Esperanto. *Linguistics*, 54(5), 1101-1133.
- Jansen, W. (2020). Compounding in Esperanto. *Linguistics in Amsterdam*, 13(2), 1-24.
- Kalocsay, K., Waringhien, G. (1985). *Plena analiza gramatiko de Esperanto (5-a korektita eldono)*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Koutny, I., Brosch, C., Jaskot, M., Vogt, H. (2008). *Germana-Esperanta-Pola etvortaro pri lingvo kaj komunikado*. Poznań: Prodruck.
- Levelt, W. (1989 [1991]). *Speaking: From intention to articulation*. Cambridge, MA: MIT Press.
- Lyons, J. (1977). *Semantics*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Neves, G., Pabst, B. (2018). *Historia vortaro de Esperanto*. Embres-et-Castelmaure: Monda Asembleo Socia.
- Norde, M. (2009). *Degrammaticalization*. Oxford: Oxford University Press.
- Olthof, M. (2020). *Incorporation: Constraints on variation*. Amsterdam: Landelijke Onderzoekschool Taalwetenschap.
- Saussure, R. de (1914 [1982]). *La vort-teorio en Esperanto*. Malaucène: Iltis.
- Saussure, R. de (1915 [1969]). *Fundamentaj reguloj de la vort-teorio en Esperanto*. Malaucène: Iltis.
- Szerdahelyi, I. (1976). *Vorto kaj vortelemento en Esperanto*. Kuopio: Librofako de Literatura Foiro.
- Waringhien, G. (Red). (2020). *Plena ilustrita vortaro de Esperanto*. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- Wennergren, B. (2005). *Plena manlibro de esperanta gramatiko*. El Cerrito: Esperanto-Ligo por Norda Ameriko.
- Zamenhof, L.L. (1905 [2007]). *Fundamento de Esperanto*. Pisa: Edistudio.

Aldono 1

Serĉo de adjektiv-enkorpigoj en Neves kaj Pabst (2018) kompare kun Waringhien (2020)

Neves kaj Pabst (2018): paĝo	Waringhien (2020)
belparolulo: 98	-
belskribado: 62, 98, 436	belskribado
belskribi : 436	-
bontrovo: 102, 474	bontrovo
bonvola: 102	bonvoli , bonvola
ebenbati : 97, 135	ebenbati
ebenbatita: 135	-
egalopinia: 141, 356	-
plenbati : 97, 380	-
plenblovi : 101, 380	plenblovi
plenblovita: 101, 380	-
plennutri : 349, 380	-
plenŝtopi : 380, 454	-
plenŝuti : 380, 455	

Aldono 2

Serĉo de substantiv-enkorpigoj en Neves kaj Pabst (2018) kompare kun Waringhien (2020)

Neves kaj Pabst (2018): paĝo	Waringhien (2020)
afertuŝante 66, 477	-
akvokonduko: 275	akvokondukilo
akvoturnejo: 476	akvoturniĝo
akvoturno: 476	akvoturniĝo
bienhavanto: 79, 100, 204	-
bienservanto: 100, 429	bienservanto
bierfaristo: 167	bierfari , -ejo, -isto

bottirilo: 103	bototirilo
brandfarado: 62, 167	-
brutedukado: 62	-
ĉevalkuraci : 114	-
ĉevalkuracisto: 292	-
ĉevalservanto: 80, 114	-
dentsono: 438	dentosono
Diservado: 63, 124, 429	-
Diservanto: 80, 124, 429	-
Diservo: 124, 429	Diservo
domhavanto: 80, 129, 204	domhavanto
fajropafa: 164	-
fiŝkaptanto: 80, 174	-
fiŝkaptisto: 174, 236, 256	fiŝkapti , fiŝkaptisto
fiŝvendejo: 174	-
fiŝvendisto: 174, 236	-
fruktoporta: 386	fruktoporta
gastama: 75, 189	gastama, -eco
gastamo: 189	gastamo
genuflekso: 190	genufleksi
harligo: 307	harligo
herbmanĝanta: 80, 206, 320	-
herbmanĝanto: 80, 206, 320	-
homama: 75, 209	homama, -o
homamulo: 75, 209, 480	-
homevitulo: 162, 209, 480	homevitulo
homtima: 209, 466	-
kantadama: 63, 75	-
kapdoloro: 129, 254	-
kaprompa: 251, 415	kaprompa
kapturno: 251, 476	kapturno, -iĝo
kolorperdemo: 270	-
korktirilo: 467	korktirilo
kornoporta: 386	kornoporta, -hava
corpama: 75	-

korpogardisto: 188, 236, 283	korpogardisto
kortuŝa: 80, 281, 477	kortuŝi , kortuŝa
kortuŝanta: 281, 477	-
kortuŝeco: 281, 477	-
Kristfesta: 170, 288	-
Kristnaska: 288, 341	-
Kristnasko: 288, 341	Kristnasko
laktovendejo: 299, 491	-
leĝdonado: 63, 131, 303	leĝdoni , leĝfari
leĝdonanta: 131, 303	-
leĝdonanto: 131, 303	-
leterportisto: 236, 305, 386	leterportisto
librokonduko: 275, 306	>librotenado
librotenado: 306, 461	librotenado
librotenanto: 306, 461	librotenanto, -tenisto
librovendisto: 236, 306, 491	-
litkovrilo: 308	litkovrilo
manmova: 336 =batema	-
manmovo: 336 =batemo	-
metalfosisto: 182, 236	-
monfaristo: 167, 237, 332	-
monoferado: 332, 352	-
monofero: 332, 352	monofero
morinstruo: 230	-
mortaĵmanĝa: 320, 335	-
naturesploranto: 157	naturesplori
ondropilo: 415	ondropilo
orelkuŝaĵoj: 294	-
paperfarado: 363	-
paperfarejo: 363	-
paperfaristo: 363	-
partoprenanto: 80, 392	-
partopreni : 366, 392	partopreni
partopreno: 366, 392	partopreno, -ado
plankfrotisto: 184, 237	frotisto

popoldiro: 126, 385	popoldiro
popolkonsiliĝo: 278, 385	-
popolrakonto: 385, 403	-
Psalmokantanto: 80, 254	-
radikesprimo: 157 = radikvorto	-
rondoturno: 476 = rotacio	-
ŝaftonado: 461	-
sangellaso: 301	sangellaso
sangoverŝo: 493	sangoverŝo
sangsuĉanta: 80, 446	sangosuĉanto
sapfaranto: 80, 167	-
sciaĵportisto: 237	-
signaldiro: 126	-
silkfara: 167	-
ŝippereo: 373, 452	ŝippereo
ŝipposedanto: 387, 452	-
ŝtonhakisto: 202, 237, 454	ŝtonhakisto
ŝtrumpligilo: 307	ŝtrumpoligilo
sukerfarado: 64, 167	-
sunkuŝiĝo: 294, 447	-
tempkalkulo: 251, 460	tempokalkulo
termezurado: 64, 462	termezuri
tertrema: 472	-
tertremo: 472	tertremo
tubfino: 173	-
turkonstruado: 64, 279, 475	-
versfarado: 492, 64, 167	versfarado
viandama: 75	-
viandmanĝanta: 81, 321, 495	-
virintrompisto: 237, 498	-
vizaĝkovrilo: 284, 500	-
voĉdono: 131, 501	voĉdoni , voĉdono
voĉhavanto: 204, 501	-
vortfarado: 64, 167, 504	vortfarado

Transskribitaj el la trafoj laŭ la serĉkriterio de Aldono 1

Neves kaj Pabst (2018): paĝo	Waringhien (2020)
bonfaranto: 79, 102, 167	bonfaranto
bonfari : 102, 167	bonfari
bonfaro: 102, 167	bonfaro
bonhava: 102, 204	bonhava
bonhavo: 102, 204	bonhavo
bonintenca: 102, 231	bonintenca
bonintence: 102, 231	-
egalintenca: 141, 132	-
egalmezura: 141, 328	-
fortuzo: 485	fortuzo
malbonintenca: 102, 231, 315	malbonintenca
malbonintenci : 102, 231, 315	-
mirindfara: 167, 227	-
riĉhavo: 204	-
sammezura: 328)	-

Pri la aŭtoro:

Wim Jansen (1948, nederlandano) diplomiĝis kiel inĝeniero en la Teknika Universitato de Delft kaj magistriĝis pri kompara kaj eŭska lingvistiko en la Universitato de Leiden. Li doktoriĝis per disertacio pri la vortordo en Esperanto en la Universitato de Amsterdamo kaj tie okupis la katedron pri Interlingvistiko kaj Esperanto inter 2002 kaj 2013.

Retadreso: wimjansen@casema.nl

ORCID: 0000-0002-7475-3756

About the author:

Wim Jansen (1948, Dutch national) holds a degree in engineering from Delft Technical University and graduated in comparative and Basque linguistics at Leiden University. He performed his doctoral research on word order in Esperanto at the University of Amsterdam, where he held the chair of Interlinguistics and Esperanto between 2002 and 2013.

Over de auteur:

Wim Jansen (1948) is afgestudeerd aan de TU Delft en studeerde vergelijkende en Baskische taalwetenschap in Leiden. Hij promoveerde aan de Universiteit van Amsterdam op een proefschrift over woordvolgorde in het Esperanto en bekleedde van 2002 tot 2013 aan dezelfde universiteit de bijzondere leerstoel Interlinguïstiek en Esperanto.

Incorporation as a word-building technique in Esperanto

Abstract: This paper contains a continuation of earlier work on word structure and word-building in Esperanto. As a complement to studies in the fields of derivation and compounding, it addresses the incorporation of nouns and adjectives in verbs as a separate word-building technique. An incorporated noun may feature as the subject or direct object in an equivalent predicate, whereas an incorporated adjective may show up as a subject or object complement in such a predicate. In contrast with derivations and compounds, which are the products of lexical processes, the results of an incorporation are presented here as products of a grammatical process, which are lexicalized for specific applications. Additionally, attention is paid to the so-called synthetic object genitives, derivations of incorporations which seem to allow two different descriptive approaches in Esperanto. The study takes a look back at the earliest development of Esperanto morphology, reviews its further deployment until today and compares the presence of incorporation-prone verbs in Esperanto with the distribution of incorporating verbs in ethnic languages world-wide. The study was performed in the theoretical framework of Functional Discourse Grammar.

Keywords: Esperanto; Incorporation; Compounding; Word-building.

Incorporatie als methode van woordvorming in het Esperanto

Samenvatting: De hier gepresenteerde studie is een vervolg op eerdere publicaties over de woordstructuur en woordvorming in het Esperanto. In aanvulling op beschouwingen over derivatie door lexicale affixen en compositie van wortelvormen bekijkt deze studie de techniek van de incorporatie van substantieven en adjectieven in verba. Een incorporeerbaar substantief kan als subject of object in een gelijkwaardig predikaat optreden. Een incorporeerbaar adjectief komt daarin voor als predicatieve bepaling als gevolg van de handeling, en kan zowel naar het subject als naar het object verwijzen. In tegenstelling tot derivaties en composities, die uit lexicale processen voortkomen, worden incorporaties voorgesteld als resultaten van een grammaticaal proces, die vervolgens voor speciale toepassingen worden gelexicaliseerd. Aandacht wordt ook geschonken aan de zgn. synthetische object-genitieven, afleidingen van incorporaties die in het Esperanto twee verschillende wijzen van beschrijving lijken toe

te staan. De analyse geeft verder een terugblik in de vroegste historie van de Esperanto-morfologie, beschouwt de verdere ontwikkeling daarvan tot op de dag van vandaag en vergelijkt de aanwezigheid van incorporatiegevoelige werkwoorden in het Esperanto met die in etnische talen wereldwijd. De studie is gemaakt binnen het theoretische kader van de Functionele Discours-Grammatica.

Sleutelwoorden: Esperanto; Incorporatie; Compositie; Woordvorming.